Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

La 2-a Virtuala Kongreso de Esperanto • 17 – 24 julio

# La Kolombo de Paco

**19-a de julio 2021, numero 9**

Redaktas Dmitrij Ŝevĉenko kaj Anna Striganova

## Gratulojn! Esperanta versio de Vikipedio atingis 300 000 artikolojn!



# Sukcesa prezento pri C2 – la nova ekzamennivelo

La 19-an de julio okazis grava prelego pri la nova ekzamennivelo C2.


Katalin Kováts, redaktoro de la retejo edukado.net, nome de la C2-temo de la paĝaro, unuan fojon prezentis la rezulton de plurmonata faka laboro, kies celo estis ellabori kaj baldaŭ lanĉi la C2 ekzamennivelon.

La C2-teamon konsistigas kvar hungaraj virinoj (!), fakuloj pri lingvotestado: Márta Kovács, Zsófia Kóródy, Pálma Csiszár kaj Katalin Kováts mem. Fakte, ili estas la ellaborintoj kaj realigintoj ankaŭ de la ĝisnunaj KER-ekzamenoj. La teamo analizis kaj komparis plurcent paĝojn, rilatajn al la plej alta ŝtupo de lingvoekzamenoj, konstruitaj laŭ la postuloj kaj normoj de la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER); analizis kaj komparis dekon da ekzistantaj modeloj de konataj ekzamencentroj en Eŭropo, kaj kreis nian, novan, propran ekzamenŝtupon, difinante la partojn de la ekzameno, elektante taskotipojn kaj kreante modelajn testojn.

Laŭ la planoj la nova ŝtupo strukture sekvas la jam uzatajn alinivelajn KER-ekzamenojn pri Esperanto, sed aperas en ĝi novaj partoj, eĉ nova taskotipo, kiel ekzemple la *C-testo*, pri kiu oni povas havi rektan sperton, sekvante la apudan QR-kodon.

La prezento de Katalin donis detalan klarigon pri la konsisto de la ekzameno kaj taksado, vidigis konkretajn taskotipojn kun atentigoj pri la malfacilaĵoj.

La antaŭtestado okazos iam en la 2-a jarduono, kaj





la unua C2-ekzameno atendeblas (plej malfrue) en la unuaj monatoj de 2022.

La prelegon ĉeestis pli ol 80 kongresanoj kaj en YouTubo sekvis en la unua horo pli ol 150 esperantistoj.

Resuman prezenton kun ĉiuj ligiloj kaj klarigoj pri la prezento oni povas trovi en la lasta novaĵo de Edukado.net: https://edukado.net/novajhoj?id=855

Ligilo en YouTubo: https://mallonge.net/fq



# Esperantomuzeo kaj Kolekto por Planlingvoj de la Aŭstria Nacia Biblioteko




Ekde la jaro 2006 la Esperantomuzeo en Vieno ciferecigis/as partojn de siaj havaĵoj. Ĉiujn pli ol 16 000 diĝitajn dokumentojn vi trovas en la katalogoj Trovanto kaj ÖNB Digital. La diĝitaj libroj, periodaĵoj, gazeteltondaĵoj kaj arkivaĵoj ankaŭ alireblas per la retejoj de la Esperantomuzeo kaj la Kolekto por Planlingvoj.

# La unua kaj dua partoj de Virtualaj Kvizoj

Marian Zdankowski

Dimanĉe vespere (la 18-an de julio je la 17:30) okazis la unua parto de Virtualaj Kvizoj. Partoprenis pli ol dudek gekongresanojn. La plej sperta kvizemulo evidentiĝis Valentin Melnikov, kiu dum unu horo solvis sep kvizojn (po dek enigmoj, demandoj); do, entute li respondis por sepdek lud-problemoj... kaj ne ĉiuj estis facilaj.

| | kvizemuloj | Parto 1 | Parto 2 | Entute |
|---|---|---|---|---|
| 1 | Valentin Melnikov | 7 | 11 | 18 |
| 2 | Monika Molnar | | 9 | 9 |
| 3-4 | Laszlo Szilvaszi | 6 | | 6 |
| 3-4 | Miguel Bento | 6 | | 6 |
| 5-6 | Tatiana Terekhova | 5 | | 5 |
| 5-6 | Armelle Esperanto | 5 | | 5 |

Nur unu poenton pli malmulte – po ses – gajnis du personoj: László Szilvási kaj Miguel Bento; kaj du




poentoj malmulte – po kvin – akiris du esperantistinoj: Tatiana Terekhova kaj Armelle Esperanto (mi suspektas, ke "Esperanto" estas ŝia pseŭdonimo).

Kelkaj partoprenantoj nur spektis Kvizojn, sed deklaris partoprenon kaj gajnon (;-) en la lunda kviz-renkontiĝo.

Lunde vespere (t.e. la 19-an de julio ankaŭ je la 17:30) okazis la dua parto de Tipaj Virtualaj Kvizoj.

Partoprenis, kiel kutime, pli ol dudek personoj. Rezulto estis jena – sur la unua loko estas daŭre Valentin Melnikov, sed la duan lokon okupas Monika Molnar... Valentin solvis dum du partoj de la Kvizoj 180 enigmojn!

Marde (la 20-an de julio je la 17:00) okazos fina, tria parto de la Virtualaj Kvizoj. Ĝi decidos pri premioj por plej spertaj kvizemuloj.

**Premioj atendas (preskaŭ) ĉiujn!**

# Uzu la okazon aliĝi al la studgrupo pri Interlingvistiko

La Adam Mickiewicz Universitato (AMU) en Poznano, unu el la plej signifaj polaj universitatoj, ofertas tri-jaran eksteran postdiploman studadon pri interlingvistiko kaj esperantologio. La internacia kursaro okazas en la Etnolingvistika Instituto, sub la gvido de Ilona Koutny kaj kun la kontribuo de elstaraj esperantologoj kiel V. Barandovska-Frank, T. Chmielik, N. Dols, I. Ertl, I. Stria, M. Farris, S. Fiedler, A. Korĵenkov, K. Kováts, A. Melnikov kaj H. Tonkin.

La Interlingvistikaj Studoj donas superrigardon pri ĝenerala kaj aplikata lingvistiko, fokusiĝas al internacia kaj interkultura komunikado, traktas planlingvojn kaj detale okupiĝas pri gramatiko, literaturo, kulturo kaj historio de Esperanto. En la tria jaro eblas specialiĝi pri komunikado, lingvistiko, literaturo, tradukado, planlingvistiko aŭ pri lingvopedagogio.

Pliaj informoj ĉe: https://edukado.net/novajhoj?id=849

Vidu ankaŭ prezenton ĉe jutubo: https://mallonge.net/fr

# Neforgeseblaj kamaradoj en la centjariĝo de SAT



La verkisto Miguel Fernández, i.a. prezidanto de la Komisiono pri Belartaj Konkursoj de UEA, prelegos pri pioniroj de la laborista Esperanto-movado en Hispanio, omaĝe al SAT en la centjara jubileo de ĝia fondiĝo.


Titolo: Neforgeseblaj kamaradoj en la centjariĝo de SAT (23-a de julio, 9:30 UTC)
https://vk.retevent.com/programo?s=kamaradoj

# Praktikaj sufloroj por tiuj, kiuj prezentas antaŭ kamerao

Leandro Abrahão

Jen praktikaj sufloroj por tiuj, kiuj prezentos antaŭ kamerao:

1. Rigardo al aliula okulo dum parolado komunikas al la interparolanto aŭ aŭskultantaro konsideron, estimon. Kiel eble do plej ofte alrigardu la lenson de la kamerao, ĉu de apo-telefono ĉu de alia aparato. Se vi bezonos legeti notojn de papero, malkaŝu tion al la publiko; informu, ke de tempo al tempo vi deturnos la rigardon por ilin legeti.



2. Se vi ordinare unusilabas (“aaaa”, “eeee”) inter viaj diraĵoj, anstataŭigu la silaban unusonadon per eksilento. Jen ŝlosila rimedo, karakterize uzata, ekzemple, de Barack Obama.

3. Ve, malpureco de la lenso! Antaŭ ol komenci filmi purigu la lenson de la kamerao. Ĉefe apo-telefonoj suferas pro la oleeco de niaj fingroj. La malpuraĵo sur ĝi rezultigas nebulecan aspekton de la video. Poŝtelefonan lenson vi povas facile kaj oportune purigi per via vesto mem. Sufiĉas froteti ĝin per la rando de via bluzo.

4. Fine, lumo! Vi ne bezonas profesian aparaton. Sufiĉas sidi kontraŭ taga lumo trairanta vian fenestron. Ĉiuokaze provu iel heligi almenaŭ vian vizaĝon.

# Esperantaj ĵurnalistoj kunvenas dum la VK

La membro-kunveno de TEĴA en 2021 okazos kadre de la 2-a VK ĉi-merkrede, la 21-ande julio, je la 12-a horo UTC, en klasĉambro. Vidu en la sistemo de Retevent.

TEĴA dum la Virtuala Movada Foiro (ViMF): jam okazigis la vidbabilejon lunde, la 19-an de julio. Sekva okazos merkrede je la 10-a horo UTC. Ĉiuj estas bonvenaj!




# Afiŝo por la Internacia Tago de Indiĝenaj Lingvoj

Renato Corsetti

La grafikisto de UEA, laboranta en la kadro de la labor-grupo pri informado pretigis afiŝon por la Internacia Tago de Indiĝenaj Lingvoj de UN. bonvolu sendi tradukon de ĉiuj vortoj en ĝi al via lingvo kaj bonvolu pretiĝi por utiligi la afiŝon en via informa agado al neesperantistoj.




**Grava anonco! Lundmatena Virtuala foiro pri Internacia Esperanto-Arkivo**

La lundmatena Virtuala foiro pri Internacia Esperanto-Arkivo (IEA) bedaŭrinde grandparte fiaskis pro teknikaj kialoj, nur la lastaj 20' iom funkciis. Ĵaŭdvespere estos dua ebleco konatiĝi kun IEA... se tiam la tekniko ne sabotos denove. Vi bonvenas.

# Kampanjo al Unesko pri la Esperanto-Tago daŭras

Huang Yinbao (Trezoro), vicprezidanto de UEA

Ĝis nun ni ricevis partoprenajn anoncojn el 30 landaj asocioj aŭ aktivuloj. Ili estas Angolo, Aŭstralio, Benino, Brazilo, Bulgario, Burundo, Ĉinio, Danio, DR Kongo, Germanio, Hispanio, Irano, Japanio, Kroatio, Litovio, Mongolio, Nederlando, Nepalo, Pollando, Portugalio, Rusio, Senegalo, Slovakio, Sud-Afriko, Taĝikio, Tanzanio, Venezuelo, Vjetnamio, Urugvajo kaj Uzbekio.

El ili Danio, Germanio, Hispanio, Irano, Nederlando kaj Portugalio – 6 landoj, jam sendis la proponajn leterojn al siaj landaj Unesko-Komisonoj/oficejo.

Ni havas ankoraŭ malpli ol du semajnojn en julio. La Plenuma Estraro de Unesko deklaros la Tagordon en ĉirkaŭ la 10-a de septembro. Vi do devas konvinki viajn naciajn Unesko-komisionojn iniciati la proponon al Unesko antaŭ fino de julio, ĉar ni devas lasi al Unekso minimume unu monaton, por ke ili digestu kaj selektu la plej taŭgajn el amasoj da proponoj el Membraj Ŝtatoj. Post la selekta decido de la Plenuma Estraro Unesko bezonas tempon traduki ilin en ĉiujn UN-lingvojn kaj aperigi ilin sur sian retejon.

Ĉiuj proponaj landoj aperos sur la Unesko-dokumento. Se vere malfruos viaj proponoj, viaj landoj riskas NE aperi sur la Unesko-deklara dokumento, tamen la proponoj post julio daŭre valide helpos en la oficiala voĉdono en novembro tiam, kiam Unesko decidos voĉdonon pri Esperanto laŭ proponoj de aliaj Unesko-komisionoj/oficejoj.

Bonvolu informi al UEA ĉe esperanto.tago.kampanjo@co.uea.org, post kiam vi sendis la proponon al via landa instanco aŭ vi havas novaĵon el viaj naciaj Unesko-Komisionoj/Oficejoj. Ni liveros al vi bezonatajn dokumentojn en la angla, franca, hispana, portugala kaj Esperanto laŭ via peto. Ni raportos la novan progreson la 22-an de julio.

*El EKO 27*

Vi povas esti aŭtoro de la *Kolombo de Paco* kaj la Reta Revuo! Por kontribui, skribu al la redakcio *redakcio@revuoesperanto.org*